From August 1 to 9, at the Moundsville Chautauqua, Mrs. Stoner, of Evansville, Indiana, will teach an Esper-

anto class each morning. Three afternoon lectures will also be delivered by Mrs. Stoner. Every Esperantist in the state is urged to be present.

### PORTLAND, OREGON.

The secretary of the Rose City Esperanto Club, Chas. J. McDonald, has just been elected a member of the Oregon legislature. He takes office next January, and will introduce some legislation looking to the promotion of the international language in that state.

### FILE HILLS, SASKATCHEWAN.

The club at this place is reported closed for the summer after an interesting season's work, with constant increase of membership. Mr. Noddings, the secretary, whose full address may be found in the Club Directory, has volunteered to register and correspond with all Saskatchewan Esperantists, and we earnestly request every one of our readers in the province to write to him for the purpose of forming an association.



**SIoux CITY, IOWA.**

The Sioux City Esperanto Club has been holding weekly classes. The beginners use the text book, the advanced class reads *Krestomatio* and talks on subjects suggested by the president. In the summer the meetings are held every two weeks. The club is preparing an outing in which only Esperanto will be spoken, under some penalty—one of those being suggested being the enforced pronunciation (100 times) of *malestim-indulegaco*. "So far," writes M. C. McConkey, president of the club, "we have aimed at a good foundation rather than spreading our influence, but next fall we will have enough proficient members to begin a good campaign."

**FONTANELLE, IOWA.**

An Esperanto club of fourteen members was founded at this place not long ago by Mrs. A. H. McDermid, who has also given lectures on Esperanto at neighboring towns. This enthusiastic esperantistino will distribute "Elements of Esperanto" at the teachers' summer school in the same county and give them a talk on the comparative advantages of the language.

**PENNSYLVANIA ESPERANTO ASSOCIATION.**

This Association was formed in May, the first meeting to be held on the 16th, in Pittsburg.

It was decided to draw up a set of By-Laws for the Association, secure a charter from the State Courts, elect officers and enter upon the work of building up a membership, composed of societies and individuals, at once. The organizers, being located within easy reach of each other, were to form a majority of the General Council during the formative period, so that the many details might be worked out with as little delay as possible. They provided in the by-laws that the first annual meeting of the Association should be held in the second week of October, this year, by which time it was hoped the organization would be completed and the As-

sociation ready to elect officers on a more geographically equitable basis.

From the first the organizers met with the most hearty responses to their overtures from the Philadelphia Esperantists Messrs. Ward Nichols, A. M. Grillon and others assisting them in many ways. After several meetings were held the by-laws were adopted and under them the following officers were elected:

President, Prof. W. B. Sterrett, Washington; Vice-Presidents, J. D. Hailman, Pittsburg, Prof. A. M. Grillon, Philadelphia; Corresponding Secretary, Kenneth C. Kerr, Pittsburg; Recording Secretary, John M. Clifford, Pittsburg; Treasurer, John P. Bell, Pittsburg; Directors: Ward Nichols, Miss Alice P. Ervin, Philadelphia; James McKirdy, H. W. Fisher, Pittsburg; Dr. Andrew Graydon, Homestead.

On Wednesday, July 22nd, at 10 o'clock in the morning, a meeting of the Pennsylvania Esperantists will be held in Chautauqua Assembly Grounds under the auspices of the Association. A program is being arranged which will include addresses by several prominent Esperantists, of Pennsylvania and elsewhere.

About the middle of June invitations were sent out by the Secretary to over five hundred societies and individuals in the State and from the responses received at the time of the writing of this article, a week or so later, there is every reason to expect that Pennsylvania, though last to join the ranks of the organized States, will not be the least.

**STORM LAKE, IOWA.**

Prof. George Fracker, A. M., D. D., and one of the active Esperantists of Iowa, has just organized a club of twenty members in Buena Vista College, at Storm Lake. Prof. Fracker is president and Miss Maude Hawkins, of Hull, Iowa, is the secretary. Prof. Fracker will attend the Chatauqua Congress as the representative of the club. A recent issue of the college paper, "The Tack," contains an interesting review of the international language question.

# E T I K O J

A. KOFMAN

Reproduktita el *The British Esperantist*

**E**N LA KVALITO de konstanta medicinisto de Sidor Karpoviĉ mi vizitis lin por sciigi lian sanecon.

Sidor Karpoviĉ, komercisto de virinaj kaj infanaj manteloj, jakoj, "sakoj," jupoj kaj de aliaj objektoj de tiu ĉi speco, marŝis larĝapaŝe en la ĉambro, kaj tio ĉi estis malbona signo. Kaj mi divenis la kaŭzon. Tio ĉi estis vera malfeliĉo. La edzo de lia fratino, lia bofrato, ankaŭ komercisto de virinaj kaj infanaj manteloj, jakoj, "sakoj" jupoj kaj de aliaj objektoj de tiu ĉi speco, subite mortis. Certe, tio ĉi ankaŭ estis granda malfeliĉo, sed ne pro tiu ĉi malfeliĉo Sidor Karpoviĉ ĉagreniĝis.

Lia bofrato mortis, lasinte vidvinon kun kvar malgrandaj infanoj, unu pli malgranda ol la alia. Antaŭ la katastrofo la edzo zorgis la komercon, la edzino la mastrumon kaj la infanojn. Nun la edzino devos preni la profesion de la edzo dum la malfeliĉaj orfoj restos izolaj. Tiel la orfoj per unu fojo perdis ne sole la patron, sed ankaŭ la patrinon, kiu nun ne havis la tempon por zorgi ilin. Certe, tio ĉi ankaŭ estis granda malfeliĉo, sed ne pro tiu ĉi malfeliĉo Sidor Karpoviĉ nun ĉagreniĝis.

Apenaŭ la bofrato de Sidor Karpoviĉ mortis, apenaŭ liaj efemeraj restaĵoj, parolante noblastile, forlasis la valon de la ploro, la kreditoroj de la mortinto ĉirkaŭis la vidvinon kiel vulturoj kadavron kaj postulis de ŝi la pagon de la ŝuldoj. Ili ne kredis la aferlertecon de

la vidvino kaj timis por sia mono. Al la virino minacis bankroto kaj malhonoro. Sendube tio ĉi ankaŭ estis granda, tre granda malfeliĉo, sed mi denove devas ĝin diri, ne pro tiu ĉi malfeliĉo Sidos Karpoviĉ nun ĉagreniĝis.

La afero estis alia. Ĉar la bedaŭrinda vidvino ne estis ĵusnaskito, ŝi sukcesis la tagon mem de la katastrofo kaŝi en tre bona loko tri kvaronojn de la komercaĵoj. Tial, kiam la kreditoroj venis minacante aresti la magazemon, ŝi komence esploris por veki en ili kunsenton kaj simpatian kaj prezentis al ili pitoreskan teruran situacion; sed ĉar la kreditoroj, post konvena kondolenca esprimo, precize klarigis al ŝi, ke simpatio kaj mono "ne veturas en sama kaleso," ŝi revenis al la prudento kaj diris pli trankvile:

"Vi uzas mian malfeliĉon por premi min, kaj tio ĉi estas kruela. Cetere, se vi insistas, mi estas preta pagi . . . 40 kopekojn por rublo."

"Kvardek procentoj? Vi ŝercas!" ili kriis.

La vidvino estis tre serioza, pli serioza ol ĉiam. Ŝi tute ne ŝercis. Ĉu oni povas ŝerci, ĵus enteriginte la edzon? Tial la komercistoj same serioze respondis, ke ili volas ricevi plene la ŝuldojn aŭ ili arestos la komercaĵojn.

"Tio ĉi estas via kruela rajto!" diris la vidvino malĝoje. Kaj ŝi mem kondukis ilin en la magazemon.

La komercistoj, homoj de granda sperto, tuj komprenis la aferon, Ili ek-

sentis grandan konfuzon, poste provis veki en la koro de la vidvino senton de honto, dirante ke ŝi riskas malhonori la honestan nomon de sia feliĉega edzo, k.t.p. Sed la vidvino, dirinte, ke ŝia edzo mortis, aldonis fingromontrante sin mem:

“Vivanta hundo estas pli zorginda ol mortinta leono.”

La komercistoj komprenis, koleris kaj minacis akuzi ŝin je friponeco kaj anonci ŝin falsa bankrotinto. Tiam la vidvino diris kun larmoj en la okuloj:

“Se vi akuzos min, kaj mi estos arestita, vi unue ne ricevos eĉ kvaronon de la ŝuldo, kaj due vi devos pagi por mia nutro, por mia loĝo en la arestejo kaj la vivsubteno de miaj infanoj. Sed rememoru, ke mi ne kondukis la aferon, kaj nur mia feliĉega edzo povas esti kulpigata je friponeco. Ĉu mi devas respondi por li? Tamen, se vi volas akordiĝi, se vi pace arangiĝos kun mi . . . tiam mi pagos 50 procentoj. Tio estas mia lasta vorto, ĉar pli mi ne povas doni. Nun agu kiel vi volas. Plendu al la tribunalo kaj faru elspezojn, se vi volas peki kontraŭ Dio.”

La kreditoroj foriris kaj faris konsilon inter si. En la fino de la finoj ili konfesis ke la vidvino estis propradire tre lerta komercistino, kiu saĝe utiligis la feliĉan okazon de la malfeliĉa morto por dikigi al si la poŝon. Kiu estas malamiko de si mem? 50 procentoj sub tia cirkonstanco, kiam ŝi povus pagi nur 40 kopekojn aŭ eĉ malpli, estas konsiderinda sumo, por kiu, se oni metos la manon sur la konsiencon, oni devas eĉ danki.

Tial la kreditoroj revenis al la vidvino kaj anoncis al ŝi sian konsenton. Ili prezentis al ŝi la kambiojn, la kontojn, la memorandojn kaj aliajn dokumentojn por ricevi 50 procentoj de la ŝuldataj sumoj.

La vidvino elpensiĝis kaj diris:

“Mi tre dankos vin por via helpo, amikoj. Sed vi ne estas la solaj kreditoroj de mia feliĉega edzo. Estas ankoraŭ aliaj. Estas Kilin, Ĵukin, Sedlov, Bannikov, Decki. Kunvenigu ĉiujn, kaj se ili konsentos ricevi la saman porcion, mi pagos al vi per unu fojo, kaj vi defariĝos per unu ekbato.”

“Al kio ni zorgos pri aliaj?” diris la komercistoj. “Kaj se ili ne konsentos? Se ili volos la planan sumon? Ni povas decidi nur por ni.”

“Miaj amikoj!” klarigis la vidvino. “Ĉu vi volas min ankoraŭ pli malfeliĉigi? Mi pensas ke mi estas sufiĉe malfeliĉa, perdinte tian edzon . . .” Kaj la vidvino ekploris.

“Sed kion vi volas?” demandis mire la komercistoj. “Ĉu ni estas sorĉistoj? Ĉu ni povas devigi fremdajn homojn konsenti al nia akordo, se ili ne volos? Virino, kion vi enmetis en vian kapon?”

“Pardonu, miaj sinjoroj, ĉu vi ne komprenas ke la solidareco estas la animo de ĉiu afero? Pripensu unu momenton! Jen vi venas kaj konsentas ricevi duonon de la ŝuldo de mia feliĉega edzo. Bonega! Vi ricevas la sumon. Sed post vi restas ankoraŭ aliaj kreditoroj. Ili certe postulos rublon por rublo. Ili rezonos: Jen la vidvino liberiĝis de la pli granda parto de la ŝuldo, kaj nun ŝi havas por pagi kompare malmulte. Tial ni persekutu ŝin kaj puŝu ŝin en senelirejon.

La komercistoj interrigardis sin.

“Ŝi estas prava! Diable prava virino!” ekkriis unu el ili.

La aliaj aprobe balancis la kapojn.

“Tial mi permesas al mi doni al vi konsilon,” daŭrigis la vidvino, modeste mallevente la okulojn. “Elektu inter vi homon honestan, kiun vi plej konfidas. Ke tiu ĉi homo kolektu ĉiujn kreditorojn laŭ la registro, kiun mi donos al vi.

Kiam li estos ricevinta en siajn manojn ĉiujn kambiojn kaj kontojn, li venu al mi, kaj ni ambaŭ aranĝos la aferon laŭ nia farita decido—por 50 procentoj.”

La komercistoj konsentis kaj foriris.

Ili elektis inter si Ivan Kostič, mian kuzon. Li estis homo energia kaj samtempe kreditoro de la mortinto, kiu ŝuldis al li 8,000 rublojn. Post intertempo de semajno li kolektis ĉiujn dokumentojn kaj venis al la vidvino.

Kaj nun okazis cirkonstanco, kiu klarigas la koleron de Sro. Karpoviĉ. La vidvino ekzamenis la dokumentojn kaj trovis ilin en ordo. Mankis nur la kambio de 8,000 rubloj de mia kuzo.

“Kaj la kambio apartenanta al vi, sinjoro, kie ĝi estas?” demandis la vidvino.

“Sinjorino,” diris mia kuzo kun mieno de senkulpa ŝafo, “Vi scias ke la pagdato de tiu ĉi kambio venos nur post tri monatoj. Ĉar mi bezonis monon, mi ĝin diskontis, la diskontisto ĝin rediskontis, la kambio transiris kelkajn manojn, kaj nun mi ne scias, en kiu urbo ĝi estas.”

“Kion do ni faros?”

“Se vi fidas mian promeson, mi ĵuras al vi, ke kiam, en la pagdato, la kambio revenos, mi elaĉetos ĝin kaj mi ĝin redonos al vi por 4,000 rubloj laŭ la agordo. Se vi estas nekredema, mi estas preta subskribi al vi la promeson, ke mi devas ĝin redoni al vi por tiu ĉi duona sumo.”

“Ne, sinjoro! Mi preferas, ke vi subskribu al mi ricevon de 4,000 rubloj je l' konto de la kambio. Tiam per si mem rezultos ke mi ŝuldas al vi la duan duonon.”

“Pardonu, sinjorino, tion ĉi mi ne faros!”

“Kial do? Ĉu ne estas al vi egale?”

“Ne! Se mi subskribos tiun ĉi ricevon kaj poste mi efektive ricevos de vi 4,000 rublojn, tiam mi povos fanfaroni, ke vi

pagis al mi plene, kaj miaj konfidintoj diros, ke mi trompis ilin, ke mi konsilis al ili kontenti je 50 procentoj dum mi mem ricevis 100.”

“Sed mi diros al ili la veron.”

“Sed se ili ne kredos vin? Ne! Mi konsentas oferi 4,000 rublojn, sed mi ne volas perdi mian komercistan honoron.”

La vidvino enpenŝigis. Si suspektis embuskon. La tuta ŝuldo estis ĉirkaŭ 60,000 rubloj; sekve la operacio metas en ŝian poŝon 30,000 da pura profito. La tuta demando estas, ĉu ŝi perdos el tiu ĉi sumo 4,000, se la sinjoro trompos ŝin. Prokrasti la tutan aferon por atendi la pagdaton de la kambio estis neeble. Unue la kreditoroj volas la monon tuj, minacante tiri ŝin al la juĝejo. Sed proceso estas malbona afero, graveda je neatendaĵoj. Due, dum la tuta tempo de la proceso ŝia komerco estos neebla, la komercaĵoj difektiĝos en la tenejo kaj fariĝos ekster-modaj. Fine elspezoj, tuta perdo de la kredito... Ne! Ŝi devas konsenti. De alia flanko, subskribita promeso preni duonon por la tuto ne havas forton antaŭ la tribunalo..

Tial la vidvino diris:

“Bone! Mi scias, Sinjoro Kostič, ke vi estas honesta homo, kiu ne volos ekspluati malfeliĉan vidvinon kaj la orfojn de la mortinto, kiu vin amis. Mi volas nenian subskribitan promeson. Via vorto estas por mi pli forthavanta ol fero kaj stalo.”

Tiel la vidvino ricevis la subskribitajn de la edzo dokumentojn je la sumo de 52,000 kaj pagis 26,000 kontante. La kreditoroj estis tre kontentaj, kaj mia kuzo ricevis de ili rekompencan de 2,600 rubloj.

Post tri monatoj li prezentis al la vidvino la kambion kaj postulis la plenan sumon. La vidvino indignis, kriis, ploris, sed nenio helpis, ĉar la kuzo minacis per proceso.

Tiam la vidvino dentogrincante kaj insultante devis pagi. Oni ne povas bankroti je 8,000, kaj ĉiun trimonaton oni ne povas bankroti ankaŭ.

Nun oni komprenas, kial Sidor Karpoviĉ, komercisto de virinaj kaj infanaj manteloj, jakoj, "sakoj" kaj de aliaj objektoj de tiu ĉi speco, marŝis kolere en sia ĉambro kaj insultis mian kuzon plej indigne.

"Sed, Sidor Karpoviĉ," mi rimarkis, "propradire mi ne komprenas la kaŭzon de via kolero. En la fino de fino mia kuzo ricevis nur sian propran monon."

"Kaj lia promeso? Lia promeso de honesta komercisto preni nur duonon?"

"Jes, lia promeso. Sed kial kaj kiel li promesis? Oni minacis, ke li, en kontraŭa okazo, ne ricevos eĉ kvaronon. Pardonu min por la ekzemplo, sed se mi iras en arbaro kaj oni kaptas min por tranĉi al mi la gorĝon, kaj mi, por min elaçeti, ĵuras pagi difinitan sumon, ĉu mi efektive devas pagi?"

"Jen ekzemplo!" sarkasme ridis Sidor Karpoviĉ. "Kompari rabiston kun komercisto!"

"Tute ne! Mi ne volas diri ke komercisto estas rabisto. Sed du diversaj homaj povas fari similan aferon. En unu okazo oni diris: monon aŭ mi prenas perforte la vivon! kaj en la dua: duonon aŭ mi prenas perforte la tuton! En ambaŭ okazoj estas tre nature ne plenumi ĝin, se oni povas."

"Vi parolas tiel, ĉar vi ne komprenas la komerciston vivon."

"Mi ne estas komercisto, Sidor Karpoviĉ, sed mi pensas, ke la parolato estas simpla ĉiutagaĵo, ne speciale komercista afero. Cetere, mi ekzamenos ĝin de komercista vidpunkto. Via bofrato subskribis kambion, t.e. faris skribitan promeson pagi. Bone! Mia kuzo faris buŝan promeson cedi al via fratino duonon de tiu ŝuldo. Bone! Sed via bofrato

aŭ lia heredinto ne volis plenumi la skribitan promeson. Kiel do vi povas postuli ke alia plenumu ĝin? Se la unua estas honesta homo, kial la dua estos fripono pro la sama konduto, precipe se la promeso pri la donaco ne estis propravola? Mi povas montri al vi, ke al mia kuzo estis tre facile ricevi ne sole siajn 8,000 rublojn, sed ankoraŭ pli."

"Li efektive ricevis pli. Oni pagis al li 10 procentoj da rekompenco."

"Ne! Li povis ricevi ankoraŭ alian monon."

"Kiel do?"

"Kio malhelpus al li deteni ankoraŭ fremdan kambion de kelkaj mil rubloj, pagi el sia propra poŝo la kondiĉitan duonon kaj poste postuli de via fratino la tuton?"

"Tio ĉi estus ankoraŭ pli granda friponeco. Sed vi ne povas kompreni ĝin. Vi ne estas komercisto. Vi ne havas la komercistan etikon."

"Komercista etiko? Kio ĝi estas?"

"Jen! Vi eĉ ne aŭdis pri tiu ĉi besto?" diris Sidor Karpoviĉ sarkasme. "Laŭ la komercista etiko buŝpromeso superas kambion kaj ĉion skribitan. Se vi promesas al mi buŝe, vi devas plenumi la promesiton, ĉar mi ne povas vin devigi per forto fari ĝin, ĝuste pro la manko de via subskribo. Tial unufoja rompo de buŝpromeso faras vin nekredinda por ĉiam. Kambio estas afero tute alia: se vi ne pagas, mi povas vin devigi per la tribunalo fari ĝin."

"Jes!" diris mi ridante. "Same kiel oni devigis-pagi vian fratinnon! Jen kio estas via komercista etiko!"

"Mia fratino? Vi pensas, ke se mia fratino pagis 50 procentojn, oni kalkulas ŝin malhonestaj komercistino?"

"Vi parolas malprecize, Sidor Karpoviĉ! Ŝi estas nur duon-malhonestaj komercistino, ĉar unu duonon ŝi pagis."

Mia kunparolanto ridis.

“Mi jam diris, ke vi nenion komprenas en nia komercista etiko. Duonbankroto ne estas malhonestajo. Montru al mi komercistojn, kiuj neniam bankrotis! Vi trovos nur maloftajn unuojn, ĉar ĉiuj aliaj bankrotis du, tri, kvar kaj pli da fojoj. Multaj bankrotas tre regule, kiel se ili havus bankrotfebron. Kaj oni ne plendas. Unu bankrotas al alia, la alia al tria, detala komercisto al maldetalisto, maldetalisto al centra liveristo aŭ fabrikisto, fabrikisto al siaj kreditoroj. La homoj estas ligitaj per solidara bankrotado. Unu mano lavas la alian, kaj ambaŭ estas . . . “malpuraj!” mi finis.

“Ne! Puraj! Propradire estas tute egale, ĉu oni pagas unu al alia la plenan sumon aŭ nur duonon. Eĉ la regnoj konfesas tiun ĉi principon en siaj interrilatoj, ĉar tio estas la bazo de la Universala Poŝta Unuiĝo.”

“Sed estas ja komercistoj, kiuj ne bankrotas. Se duonbankroto ne estas malhonestajo, kiel vi nomos la konduton de komercisto ĉiam paganta?”

“Mi nomos ĝin lukso. Ĉiu barono havas sian fantazion, kiu ne estas deviga por la meza-sana homo. Devigaj estas nur la neskribitaj leĝoj, la komercista tradicio, la komercista etiko, kaj ĉiu, kiu rompas ilin, estas fripono.”

“Tiu etiko estas kimero, kiu ne ekzistas. Ne estas komercista etiko. Estas homa etiko, homa ĝojo, homa nazkataro. Kaj se iu parolos al mi pri botista etiko, pri tombista ftizo, pri librotenista nazkataro, pri kandelista ĝojo, mi ridos rekte al lia vizaĝo.”

Sidor Karpoviĉ fikse rigardis min kaj demandis:

“Ĉu vi efektive farus ĝin?”

“Certe mi farus ĝin! Kial vi min rigardas tiamaniere?”

“Mi esperas, ke vi estas medicinisto, vera medicinisto?”

“Kia stranga demando!”

“Prezentu al vi, ke malsanulo vizitas vin. Tiu ĉi malsanulo estas ftizulo, kankrulo, degeneranto, mallonge, homo danĝera por sia intima apudulo. Ni supozu, ke li havas fianĉinon kaj pretigas edziĝi. Ĉu vi avertus la fianĉinon aŭ siajn gepatrojn pri la danĝero?”

“Hm . . . tio ĉi estas malpermesata . . . Sed mi povas averti la malsanulon mem.”

“Kaj se la malsanulo estos obstina kaj volos edziĝi? Kio? Vi silentas? Jes certe vi silentos! . . . Aŭ ni prenu alian ekzemplon. Mi, via paciento, ĉesas konfidi vin kaj invitas alian mediciniston por kontroli vin, sed sen via alesto kaj scio, ĉar mi timas ke via samprofesiano ne volos fari al vi honton kaj nomi vin fuŝisto. Se la nova medicinisto sciigus, ke mi havas alian kuraciston, kiun mi volas kontroli, ĉu li volus helpi al mi? Kio? Vi denove silentas? Sed tamen en aliaj cirkonstancoj oni havas la rajton kontroli, kaj estas tre multaj kontrolistoj en bankaferoj, en fabrikejoj, en konstruado, en fervojoj, en terkulturado kaj en aliaj profesioj. Ĉu mono, domo, vagono, rikolto estas pli grava al mi, ol mia sano, mia vivo? Kial do vi medicinistoj ne permesas al mi savi ĉiurimede per kontrolo tion, kiu laŭ mia opinio, eble falsa, sed tamen laŭ mia firma opinio estas la plej kara al mi? Jes! Vi medicinistoj havas medicinan etikon, kiu malpermesas al la kuracistoj malsekretigi la malsanojn, eĉ kiam ili estas venenaj, aŭ kontroli vian kuracon. Jes, ĉiuj profesioj kaj metioj havas diversajn etikojn, kaj ne sole diversajn etikojn, sed eĉ diversajn religiojn.”

“Kion vi diras?”

“Tute simple! Ĉu vi ne aŭdis, kiel butikisto ĵuras per ĉiuj sanktuloj, ke la prezo anoncata de li al la aĉetanto estas la plej malalta, ke ĝi estas lia propra kosto, ke li donas la komercaĵon tiel

malkare, ĉar . . . nu, ĉar li hodiaŭ nenion vendis, aŭ ĉar ĝi estas la lasta restaĵo, aŭ ĉar vi mem plaĉas al li, k. t. p. ? . . . Vi ĝin certe aŭdis centfoje ?”

“Tio ĉi estas simpla malpiaĵo aŭ malsaĝaĵo de butikisto.”

“Nova eraro! La butikistoj estas nek malpiuloj nek malsaĝuloj. Por povi ion gajni kaj decidigi la aĉetanton, ili faras escepton en la apliko de ĵuroj, kiuj konsideriĝas kiel nulvalorantaj ekskluzive en la afero de ilia speciala profesio. En ĉiuj aliaj regionoj la butikistoj estas piaj homoj, fervore preĝas en la temploj, lernigas al siaj infanoj la religion, la komunan religion de la Kristanoj, ne la specialan de butikistoj.”

“Ĉu ne ekzistas ankaŭ specialaj politikaj ekonomioj, kontraŭaj al la ĝenerala ?” mi demandis por kaŝi la embarason.

“Kial ne? Por privata homo ĉiu moŝto estas kapitalo. Se kartludisto gajnas, li grandigas sian kapitalon; se li perdas, li malgrandigas ĝin. Sed de la vidpunkto de la regno, tio estas nek grandigo nek malgrandigo de la kapitalo, sed nur simpla transigo de mono el unu poŝto en alian. Same ekzistas ŝtelista politika ekonomio, ŝtelista etiko, ŝtelista punkto de honoro, ŝtelista tradicio, k. t. p.”

Mi silentis de konfuzo. En mia koro kreskis suferanta sento, kiu baldaŭ akre difiniĝis. Tio ĉi estis teruro. Efektive, la homaj interesoj estas tiel dividitaj, tiel kontraŭaj unu al alia, ke la bono, moraleco, pieco, de unuj estas malbono, malmoraleco por aliaj. La feliĉo de unuj baziĝas sur la malfeliĉo de aliaj. Ne estas homa etiko: estas etiko de medicinistoj, de ŝuistoj. Ne estas homa politika ekonomio: estas politika ekonomio de agristoj vilaĝanoj, de laboristoj, de fabrikistoj. La bela granda or-monero ŝanĝiĝis je rustantaj kupraj moneraĵoj, makulantaj la manojn de tiuj, kiuj ilin uzas. Mi estis tiel konsternita, ke mi forgesis, ke mi estas inteligenta homo kun universitata diplomo kaj ke Sidor Karpoviĉ estas malklera komercistaĉo, kaj mi diris:

“Mi dankas vin por la leciono, Sidor Karpoviĉ! Sed diru, kion oni devas fari por kunigi ĉiujn tiujn etikojn en unu homa etiko, ĉiujn profesiajn politikajn ekonomiojn en unu homa politika ekonomio, k. t. p.?”

Sidor Karpoviĉ atente rigardis min, fermis la malfermitajn fenestrojn kaj diris mallaŭte:

“Lasu tiujn ĉi senutilajn demandojn! En Rusujo tio ĉi estas danĝera temo.”



## EL “TUTMONDA ANEKDOTARO”

En la Lernejo

Nova Bubeto

Diris instruisto dum la gramatika instruo:

“Ni nun volas formi frazojn kun personaj pronomoj: mi, vi, ŝi, li, k. t. p. Se ekzemple la patro dirus ‘Mi foriras,’ kion respondus tiam la patrino al patro?”

*Lernanto:* “Vi restos hejme.”

*Patrino:* “Sed bubeto, jam denove vi batiĝadis kun Pepito, kaj kia nun estas via eksteraĵo! Jam ree mi bezonos aĉeti por vi novan vestaĵon.”

*Fileto:* “Ho! Vi do nur vidu Pepiton! Lia patrino bezonos tute novan bubeton.”



## THE BEGINNER AND HIS TROUBLES

"I am overwhelmed with amazement that you do not have more of the department 'The beginner and his troubles' in the journal. I am quite sure it would be acceptable to ninety per cent of your readers," writes M. E. Collins.

That sometimes surprises us, too. But it never overwhelms us with amazement, for when one comes down to that page he ardently wonders what to put in it and what to leave out. Just to please Mr. Collins and the rest of the ninety per cent we seize the first sentence of the last manuscript received, evidently from a beginner:

**Jen estis unufoje homo, kiu lokis siajn retakaptilojn.**

Here is a sentence grammatically above reproach. It is excellent English, too: *There was once a man who had set his snares.*

This is the trouble of the beginner, the advanced student and even the expert—thinking in the mother-tongue, especially when translating.

**Jen** means *behold*, and while not necessarily emphatic it usually applies to some occasion of surprise (*look!*), something to command attention, *now*. Used in this way, *there* has no reference to place, has really no meaning, being employed to "limber up" the sentence. So **estas** alone is used, and not **jen estas** or **tie estas**.

**Unufoje** means *once, one "time,"* but it does not convey the evasive sense of *once upon a time*; it is mathematical, and the precedent of *twice, thrice*, etc. If you want the word for a wholly indefinite *date*, it is better to use **iam**.

**Homo** means *human being* indefinitely, and **viro** *a man*.

**Loki** for *set* or *place* traps, is not so

good as **arangi**, or **pretigi**.

The author of this translation writes good English, and probably reads Esperanto fluently. But he must read much Esperanto literature before he can write good Esperanto. For example, the average fourteen-year-old American has been using English thirteen years and can write a grammar school essay, but he has not learned to write matter which would look well in print.

Don't try to write Esperanto for publication while you are too young. Be glad that you can read, and do so—read, read, read.

That for the beginner whose grammar is "perfectly good." For the beginner whose grammar is bad, we can only advise careful study of the text book. We have seen a post card written by a young lady who is supposed to have been an Esperantist for a year, in which she calmly says **mi voli al fari** for *I wish to do*. Why not, indeed? The vocabulary says that *wish* is **voli**, *to* **al**, and *do* **fari**. She had studied the vocabulary, but not the grammar.



*Editor:* I would ask your criticism on the following sentence: **Venu kaj laboru (aŭ labori) en mia ĝardeno.** I notice that many writers use the infinitive **labori**, but it strikes me that the imperative **laboru** should be used, as it has the same force as the imperative **venu**. Which would you regard as correct?

—W. L. C.

It is simply a matter of preference, either form being correct, though perhaps there is a shade of difference in meaning. In English, *come and see me* and *come to see me* are both correct, though probably the fanatics who strive toward the ever-shifting goal of "scholarly English" use the latter form.

## LA KUKUNJANA PAROĤESTRO

Esperantigita el la Franca laŭ A. Daudet de

BENEDICT PAPOT

La abato Martino estis paroĥestro de—Kukunjano.

Tiel bona kiel la pano, tiel vera kiel la oro, li patre amis siajn Kukunjananojn: por li, lia Kukunjano jam estus paradizo sur la tero, se liaj Kukunjananoj al li donus iom pli da kontentigo. Sed, ho ve! la araneoj spinis en la konfesejo, kaj dum la bela paska tago restis la hostioj en la fundo de la sankta kaliko. Tio vundis la koron de la bona pastro kaj li ĉiam petis de Dio, kiel favoro, ke li ne mortu antaŭ ol li estos rekondukinta al la ŝafejo sian disigitan aron.

Nu, vi vidos, ke Dio lin aŭdis.

Dimanĉon, post la diservo, supreniris Sinjoro Martino en la katedron.



- *Li diris:*

Miaj gefratoj, vi kredos min se vi volas, lastnokte mi trovis min, mi mizera pekulo, ĉe la pordo de la paradizo.

Mi frapis: Sankta Petro malfermis al mi.

“Nu! Estas vi, mia bona Sinjoro Martino,” li diris al mi, “Kia bona vento alkondukas vin? Kaj kion mi povas fari por vi?”

“Bela Sankta Petro, vi, kiu tenas la ŝlosilojn de la paradizo, ĉu vi povus diri al mi, se mi ne estas tro sciema, kiom da Kukunjananoj vi havas en la paradizo?”

“Mi havas nenion, kion mi povas rifuzi al vi, Sinjoro Martino; sidiĝu do, ni vidos la aferon kune.”

## LA KUKUNJANA PAROĤESTRO

Kaj Sankta Petro prenis sian grandan libron, malfermis ĝin, surmetis siajn okulvitrojn :

“Lasu nin vidi: Kukunjano, vi diris—Ku—Ku—Kukunjano. Tie ni estas! Kukunjano. Mia bona Sinjoro Martino, la paĝo estas tute ne skribita! Ne unu animo! Ne pli da Kukunjananoj ol fiŝostoj en meleagrino!”

“Kiel! Neniu el Kukunjano ĉi tie? Neniu? Ne estas eble! Rigardu do pli bone!”

“Neniu, sankta homo. Vidu mem, se vi kredas, ke mi ŝercas.”

Mi, Dio mia, mi piedfrapis kaj kun manoj kunmetitaj mi kriegis por kompatato.

Tiam Sankta Petro diris :

“Kredu min, Sinjoro Martino, vi ne devas tiamaniere malbonigi al vi mem la sangon, ĉar vi povus per tio havi apoplekcion. Post ĉio, tio ne estas via peko. Viaj Kukunjananoj kredeble pasas iom da kvaranteno en la purgatorio.”

“Ha, per bonfarado, granda Sankta Petro! Farigu, ke mi povos ilin almenaŭ vidi kaj konsoli.”

“Volonte, mia amiko. Jen, piedvestu tiujn ĉi sandalojn, ĉar la vojeto ne estas tre bone. Jen estas bone! Nun vojiru rekte antaŭen. Ĉu vi vidas—tie,—malproksime—ĉe la turno? Vi trovos tie arĝentan pardonon tute kovritan per nigraj krucoj—dekstramane. Vi frapos, oni malfermos al vi. Bonan tagon. Restu sana kaj fortika.”



Kaj mi vojiris—mi vojiris! Kia vojirado! Miaj haroj stariĝas pripensante pri tio! Malgranda vojeto, plenigita de dornarbetaĵoj, de karberoj kiuj lumadis kaj de serpentoj kiuj sibladis, alkondukis min al la arĝenta pordo.

“Tok, tok!”

“Kiu frapas?” diris raŭka kaj plenda voĉo.

## BENEDICT PAPOT

“La paroĥestro de Kukunjano.”

“De—?”

“De Kukunjano.”

“Ha! Eniru.”

Mi eniris. Granda bela anĝelo, kun flugiloj tiel malhelaj kiel la nokto, kun vesto tiel hela kiel la tago, kun slosiloj el diamantoj pendantaj de la zono, skribadis,—kra—kra— en granda libro, pli granda ol tiu de Sankta Petro.

“Fine, kion vi volas kaj kion vi demandas?” diris la anĝelo.

“Bona anĝelo de Dio, mi volas scii—mi eble estas treege sciema—ĉu vi havas tie ĉi la Kukunjananojn?”

“La—?”

“La Kukunjananojn,—la anojn de Kukunjano,—tial ke, estas mi—kiu estas ilia paroĥestro.”

“Ha! La abato Martino, ĉu ne?”

“Por servi al vi, Sinjoro anĝelo.”



“Kukunjano, do, vi diras”—kaj la anĝelo malfermas kaj ekturnas la foliojn de sia granda libro, malsekigante sian fingron per kraĉaĵo por ke la folio glitu pli bone.

“Kukunjano”—li diris kun longa ekĝemo. “Sinjoro Martino, el Kukunjano en la purgatorio ni havas neniun.”

“Jesuo! Mario! Josefo! Neniu el Kukunjano en la purgatorio? Ho! Granda Dio! Kie do estas ili?”

“Nu! sankta viro, ili estas en la paradizo. Kie, diable, vi volas, ke ili estu?”

“Sed mi venas ja de la paradizo—”

“Vi de tie venas! Nu?”

“Nu! ili ne estas tie! Ho! bona patrino de la anĝeloj!”

“Kion vi volas, Sinjoro paroĥestro? Se ili ne estas en la paradizo nek en la purgatorio, ne ekzistas mezoloko, ili estas—”

## LA KUKUNJANA PAROĤESTRO

“Sankta Kruco! Jesuo, filo de Davido! Ho ve! ho ve! Ĉu estas eble? Ĉu tio povas esti mensogo de la granda Sankta Petro? Tamen la kokon mi ne aŭdis kanti! Ho ve! Kiel mi iros en la paradizon, se miaj Kukunjananoj ne estas tie?”

“Aŭskultu, mia malfeliĉa Sinjoro Martino, tial ke vi volas, ĉiel ajn, esti certa pri tio ĉio kaj vidi per viaj propraj okuloj kio estas, sekvu tiun ĉi vojeton, kuru rapide, se vi scias tiel fari. Vi trovos maldekstre pordegon. Tie vi sciigos pri ĉio. Dio donas tion al vi.”

Kaj la anĝelo fermis la pordon.



Estis longa vojeteto tute pavimita per ruĝaj fajraj karboj. Mi ŝanceliĝis kvazaŭ mi estus drinkinta, mi faletis! mi estis tute malsekigita, ĉiu haro de mia korpo havis ĝian guteton da ŝvito, kaj mi spiregis de soifo. Sed kredu min, dank' al la sandaloj kiujn al mi pruntedonis la bona Sankta Petro, mi ne bruligis miajn piedojn.

Kiam mi estis sufiĉe paŝinta, mi vidis, maldekstren, pordon—ne, pordegon—grandegan pordegon, kiu estis tute nefermita, kiel la pordo de granda forno. Ho! infanoj miaj! Kia vidiĝo! Tie, oni ne demandas al mi mian nomon; tie, ne ekzistas registrolibro. Per amasoj, plena-porde, oni eniras tien, miaj fratoj, kiel vi eniras, dimanĉon, en la driŝkejon.

Mi ŝvitegis, kaj tamen mi malvarmiĝis, mi frosttremiĝis. Miaj haroj stariĝis. Mi flaris la brulodoron, la rostigitan karnon, ion kiel la odoron kiu disŝutiĝas en nia Kukunjano, kiam Elio, la hufforgisto, bruligas, por bati ĝin, la hufon de maljuna azeno. Mi ne povas spiri en tiu ĉi malbonodora kaj brula aero. Mi aŭdis terurajn kriojn, ekĝemegojn, blekegojn kaj blasfemojn.

“Nu ĉu ci eniras aŭ ne eniras?” diris al mi kornport-

## BENEDICT PAPOT

anta demono, min borante per sia forkego.

“Mi ? mi ne eniras. Mi estas amiko de Dio.”

“Ci estas amiko de Dio ! Nu, malbenita favulo ! kion ci venas fari tie ?”

“Mi venas—Ha ! ne parolu al mi pri tio, ĉar mi ne povas pli stari—mi venas—mi venas el malproksime—malfiere—por demandi vin ĉu—ĉu—hazarde—vi havus tie ĉi—iun—iun el Kukunjano ?”

“Ha ! fajro de Dio ! Ci diras malspritaĵojn kvazaŭ ci ne scias, ke estas tie la tuta Kukunjanaro ! Vidu, malbela korvo, rigardu—kaj ci vidos kiel ni aranĝas ilin tie ĉi, ciajn famajn Kukunjananojn !”



Kaj mi vidis, meze de terura flamturigo, Grandan-Kokgalinon,—vi ĉiuj konis lin, miaj fratoj,—Kokgalinon, kiu sin tiel ofte ebriigis, kaj tiel ofte skuis al sia malfeliĉa edzino la pulojn (batis ŝin).

Mi vidis Katarinon,—la malgrandan malbonulinon—kun ŝia suprenturnita nazo—kiu kuŝiĝis sole en la garbejo—vition rememoras, santaŭguloj ! Sed ni preterpasu, mi jam diris tro pri tio.

Mi vidis Paskalon, la glufingrulon, kiu faris sian oleon el la olivoj de Sinjoro Juliano.

Mi vidis Babeton, la postrekoltantinon, kiu, postrikoltante, por fini pli rapide sian garbon, ĉerpis plenmane el la garbejo.

Mi vidis mastron Grapason, kiu tiel bone oleumis la radon de sia puŝveturilo.

Kaj Dofinon, kiu vendis tiel kare la akvon el sia puto.

Kaj Tordulon, kiu ĉiufoje kiam li min renkontis dum mi portis la sanktan hostion, preterpasadis, kun la ĉapo sur la

## LA KUKUNJANA PAROĤESTRO

kapo kaj la pipo en la beko—tiel fiera kiel Artabo—kvazaŭ li renkontus hundon.

Kaj Kulon kune kun lia Zetino, kaj Jakobon, kaj Petron, kaj Tonion—



*Kortuŝita, paligita de timo, ekĝemis la tuta aŭdantaro, tiu vidante en la malfermita infero sian patron aŭ sian patraron, sian avon aŭ avinon.*

*Daŭrigis la bona abato Martino:*

Vi bone sentas, miaj fratoj, vi bone sentas, ke tio ĉi ne povas daŭri. Mi gardas viajn animojn, kaj mi volas, mi volas vin savi el la abismo al kiu vi estas ruliĝantaj kapon antaŭen.

Morgaŭ mi eklaboros. Kaj laboro al mi ne mankos. Jen kiel mi faros: por ke ĉio fariĝu bone, oni devas fari ĉion orde. Ni iros laŭvice, kiel ĉe Jonkjero dum la dancado.

Morgaŭ, lundon, mi aŭdos konfese la maljunulojn kaj la maljunulinojn. Estas nenio.

Mardon, la infanojn. Mi baldaŭ finos.

Merkredon, la junulojn kaj la junulinojn. Tio eble daŭros.

Ĵaŭdon, la virojn. Ni tranĉos tion mallonge.

Vendredon, la virinojn. Mi diros: "Ne diru tro multe."

Sabaton, la mueliston! Tuta tago ne estas tro multe por li.

Kaj se ni finiĝos dimanĉon, ni estos feliĉegaj.

Vidu, miaj infanoj, kiam estas matura la greno oni devas rikolti ĝin. Kiam estas elversita la vino, oni devas trinki



## BENEDICT PAPOT

ĝin. Jen sufiĉe da malpura tolaĵo, oni devas lavi ĝin, kaj ĝin bone lavi.

Tio estas la beno, kiun mi al vi deziras. Amen



Tiamaniere okazis ĉio. Oni faris grandegan lavadon. De tiu ĉi rememorinda dimanĉo oni flaris la bonodoron de la virto de Kukunjano de dek mejloj ĉirkaŭe.

Kaj la bona feliĉa pastro, Sinjoro Martino, songis postan nokton, ke, sekvate de sia tuta aro, li supreniras, procesie, meze de ekbruligitaj kandelegoj, de nubo de bonodorfumo kaj de kantantaj ĥorknaboj, la luman vojon al la Urbo de Dio.

Kaj jen, la rakonto pri la Kukunjana paroĥestro, kiel ordonis, ke mi rakontu ĝin al vi, tiu ĉi malbonegulo Romanilo, kiu estis mem alia bona fratulo.

# LA INVITANTINO

W. J. PHOEBUS

**K**ELKAJN jarcentojn en la estinteco unu greka marmoristo, Sro. Pigmalion, elhakis sufiĉe belan inan homsimilaĵon, kaj sukcesis viviĝi ĝin virino, kiu tuj devigis al li, ke li edziĝu je ŝi. En niaj tagoj, kiam la franca pogrando de bronzaĵoj, Sinjoro

Bartholdi, fabrikis en sia fandejo la diversajn membrojn de la famekonata Diino de la Libereco, li ne volis, ke oni tie kunmetu ilin en homan formon. Eble li ne kuraĝis riski, ke la figurino fariĝu vivanta fraŭlino, kiu povus proponi edzinigi je li. Povus ja esti neoportune,

havi en la domo virinon tiel grandan, eĉ se oni ne bankrotus aĉetante por ŝi unu ĉapelon. Tial Bartholdi preferis luigi ŝipon, kaj sendi la disigitajn pecojn trans la maron al Nov-Jorko, por lasi rekunigi ilin tie, sen danĝero al lia persona libereco. Tamen, ŝajnas, ke ia timo, ke ŝi vivigiĝu, estis tute senfundamenta, ĉar post lerta kunmeto de la membroj kaj pli ol dudekjara staro de la figurino sur ŝia granita piedestalo en Nov-Jorka haveno, ŝi ĝis nun tute ne vivigiĝis. Ĉu pro tio oni devas ŝin kompati? Ho ne, se kredindaj estas la vortoj de la Predikanto, filo de Davido, reĝo en Jerusalemo, kiu iam anoncis :

“Kaj mi trovis, ke la mortintoj, kiuj antaŭ longe mortis, estis pli feliĉaj ol la vivantoj. Kaj pli feliĉaj ol ili ambaŭ estas tiuj, kiuj ĝis nun ne ekzistis, kiuj ne vidis la malbonajn farojn, kiuj estas farataj sub la suno.”

Alivorte, se la nunaj kon-



diĉoj mondaj estas tiaj kiaj la tiamaj (kaj ni timas, ke ili estas), nia senvida, senkora bronzulino estas pli feliĉa nunstate, ol ŝi estus, fariĝinte vidantino de ĉiuj malbonaj faroj farataj sub la suno. Sed estas al ni ankoraŭ permesate, konservi kelkan esperon, ke iatempe eble venos tagoj, en kiuj ŝi povos viviĝi, sen suferi troajn dolorojn; tagoj, kiujn antaŭvidis Robert Burns, kantante:

“Ni preĝu, ke fariĝu ti’  
Kaj nepre ti’ fariĝos,  
Ke sur la ronda tera glob’  
La homoj kunfratiĝos.”

Ĉar la neatendita iafoje okazas, kaj ĉar ne estas absoluta neeblaĵo ke ni ĝisvivos tagojn, kiujn ŝi povos toleri, ŝajnas konsilinde doni al la estimataj legantoj priskribon pri la Fraŭlinego, tiel ke, se ili iam vidos ŝin forlasinta sian piedestalon kaj marŝanta tra la landoj, ili povos tuj rekoni ŝin kaj ne forkuri, timante ke ĉasas ilin *Idino*, aŭ eble Sinjorino Ĉefdiablego mem. Kaj por trankviligi ĉiun fraŭlon kaj vidvon, ni sciigas al ili konfidencie, ke ŝi ne edziniĝos je ia aparta hometo, estante jam fianĉinego de Sro. Tuthomaro.

La Nov-Jorka ŝtata leĝfarantaro lastatempe faris leĝon malpermesantan ke la

polico mezuru aŭ faru fotografajon de persono ĝis kiam ĝi estos juĝita kulpa je krimo. Mi ne scias kiu mezuris nian diinon, sed jen ŝiaj Bertillonajoj:

	FUTOJ COLOJ	
Alteco de fundo ĝis torĉo - - -	151	1
De fundo di* piedestalo ĝis torĉo	305	6
Longeco di mano - - -	16	5
Longeco di montra fingro - - -	8	0
Rondmezuro di montra fingro ĉe dua artiklo - - -	7	6
Kapo, de mentono ĝis kranio - -	17	3
Trans la okulo - - -	2	6
Nazlongeco - - -	4	6
Longeco di dekstra brako - -	42	0
Maksimuma dikeco di dekstra brako	12	0
Dikeco ĉe talio - - -	35	0
Largeco di buŝo - - -	3	0
La tableto, kiun ŝi portas en la mano, estas: longa - - -	23	7
larga - - -	13	7
dika - - -	2	0

La kolosino pezas 450,000 funtojn. La bronzo sola pezas 200,000 funtojn. Kvarkek personoj povas stari senge en la kapo, kaj la torĉo povas enteni dekdu homojn. La ŝtuparo kondukanta de la piedestalo ĝis la kapo konsistas el 154 ŝtupoj, kaj de tie ĝis la torĉo estas *ladder* el 54 transbastonoj (angle, *rounds*).

\*Proposed new preposition



## LA ĈIELO LIN BENU!

Metodista pastro rakontis al mi antaŭnelonge pri sia lasta nesukceso. Enirante la oficejon de loka semajna ĵurnalo, li diris al la redaktoro: “Mi estas petanta monhelpon por sinjoro de ĝentileco kaj inteligenteco, kiu bezonegas multmalte da kontanto, sed kiu estas multe tro fiero por sciigi pri siaj suferoj.”

“Ja!” ekkriis la redaktoro, suprenpuse sian okulŝirmilon, “Mi estas la

sola virĉjo en la vilaĝo, kiu respondas al tiu priskribo. Kio estas la nomo de la sinjoro?”

“Bedaŭrinde,” diris la pastro, “mi ne havas liberecon por sciigi.”

“Do tiu devas esti mi,” diris la redaktoro. “Estas mi—estas mi sendube! La ĉielo vin prosperu, Pastro, en via bona laboro!”

—Esperantigis Mrs. E. A. Russell, Ord. Neb

# CORRESPONDENCE

## FOREIGN POSTAGE.

*Editor*:—Is there any way to tell the exact postage required to send cards to foreign countries other than constant inquiry at the post office?

*D. W. Newton.*

New Rockford, N. D.

Yes. Ask the postmaster to give you printed matter containing such information. The one-cent rate applies to Canada, Mexico, Cuba, Panama, and territories of the United States. All other countries within the Postal Union, which includes most of the dry land of the earth, are two cents.



## HE WANTS TO KNOW.

*Dear Sirs*:—I would like to suggest that for the benefit of the new converts to Esperanto you publish an account of the aims and purposes of the American Esperanto Association; also, whether there is any way to unite with the Association, what the cost is and if there is any symbol of membership. I consider that *Amerika Esperantisto* needs very little to make it a most perfect paper for the language. Is your offer of books for town libraries only, or does it extend to school libraries as well?

*Huber La Moreaux.*

R. F. D. 2, Zimmerman, Minn.

The A. E. A. is so busy cutting its teeth that it will not sit for its biography. It is less than three years old. The green star is the international symbol of Esperanto, but the A. E. A. has no special badge except the red badge of courage, which is worn pink to avoid confusion with the international "reds." Not to mention a perfect paper, AMERI-

KA ESPERANTISTO needs about twelve thousand things to make it just a comfortable paper. Most of these are silver discs with our national prevarication embossed on the front: "In God we trust." Our library offer extends to all libraries of a public or semi-public nature; that includes, of course, those of the schools.



## WANTS IT AT N. Y. C. COLLEGE.

*Editor*: As to that Fifth Congress, We know that our language aims to make all men brothers; that for this to be successful all things must be distributed equally; and for the last, everything used or justly desired by all should be owned by the government and given gratis, though indirectly paid for by just taxation. Now, the College of the City of New York is the only one where these conditions prevail, and, *what's more, successfully.* Its auditorium, seating 2,400 people, is open to all public uses, and could easily be obtained free. I therefore propose that the Fifth Congress take place in New York at this college.

*H. D. Jacobson,*

College of the City of New York, June 1, 1908.

The "brotherhood of man," "our dear language," our holy cause," and kindred expressions used in connection with Esperanto are misleading in a way. Socialists, anarchists, Christians, Mohammedans, all believe in the "brotherhood of man," though frequently having such differences of opinion as to how it shall be brought about as to involve them in direct battle one against

the other. Certainly Esperanto has nothing to do with public ownership. To be sentimental about the language is a matter of individual choice.



#### ESPERANTO ON REPLY COUPON.

Samuel St. Thomas, of 272 75th Street, New York City, is of the opinion that it is possible to have Esperanto added to the various languages in which the text of the international postal reply coupons are printed. We cheerfully delegate the details to the gentleman who makes the suggestion, and all who are willing to help push the matter may write him. By the way, the coupon (concerning which we occasionally receive inquiries) is a slip of paper, exchangeable in any country for a stamp of five-cent value. It can be purchased at any post office and costs six cents. Thus, for small amounts, its use is cheaper and more convenient than paying the ten cents exchange on a foreign money order.



#### WHAT CAN HE DO?

*Dear Editor:*—I want to call your attention to the fact that many persons whose names appear in the list of correspondents for the exchange of post cards never reply. Is this proper? If you can suggest any remedy I would be very glad to hear of it.

*Curtis B. Lore.*

111 W. Market St., Danville, Penna.

There is no way to compel people to reply, but there are two ways in which to avoid the inconvenience or annoyance. The first is, advertise for yourself. When I wish to employ help, I never write to those who have advertised for work, but put my own advertisement in the "Help Wanted" column. It is a foregone conclusion that twenty will apply for the situation and

nineteen be disappointed, but I would rather disappoint nineteen people than be disappointed nineteen times myself. The other way is to join some correspondence society which periodically expels all members who fail to send replies. How to find the address of such a society? Again—advertise.



#### A HATFUL OF SUGGESTIONS.

*My Dear Editor:* Seeing you have set apart a column for the views of your readers and at the request of friends, I want to communicate a few ideas touching Esperanto propaganda in Usono, which ideas, given in all humility, are to be taken strictly on their own merits, if they have any.

Our great lack is *unity*. The American Esperanto Association is not what it ought to be—the first force for Esperanto in the country. The commercial firm, The American Esperantist Company, as it avers itself, is doing more for the movement than any single agent in the country.

A. E. A. lacks unity because it lacks an official organ. No effective national society can do without a periodical means of communication with its far-scattered members. It is true that, AMERIKA ESPERANTISTO supplies this medium by *courtesy*, but we need more than that. In short, why cannot the AMERIKA ESPERANTISTO be officialized? It is the pioneer paper in Usono, the largest and best-supported. Let the National Congress vote first of all on this essential matter. The whole paper need not be run by the Association. The *Germana Esperantisto* has "an official part" which alone contains the work of the Association in Germany. Let Mr. Baker's company and A. E. A. combine. This seems to me to be the practical way of combining.

Another idea—why not a clause in the constitution constituting all Esperantists *ipse facto* honorary members of A. E. A.,—as does the B. E. A.? This is an easy thing, but a good one, I think. Make it known that all honorary mem-

bers and clubs will be enrolled on receipt of names. No dues, of course. Active members of course to pay dues and to alone have voice in ordinary government.

Let us work for the Fifth Congress. The work will do us good, even if we do not get that Congress.

Let us not forget the small Chautauquas, of which there are 200-300 in the country. For instance the Moundsville Chautauqua is to have Mrs. W. S. Stoner teach every morning and deliver three afternoon lectures. Just make known to the Boards of the various small Chautauquas the work of the main Chautauqua.

In order to have none but earnest people as active members of the local groups, would it not be well to set up an examination corresponding to the "Atesto pri Lernado," passing which alone constitutes one an active member locally?

All but my first suggestion I regard as *rekomendinda*. My first idea, touching an official organ, I regard as absolutely *deviga*. It seems to me essential to our further progress.

Yours in the work,

Hubert M. Scott.

1312 Purdy Ave., Moundsville, W. Va.



#### THOSE NEW ROOTS.

